

# **Stenografia sistemo T-linio (Teeline)**

**Adaptiĝo al Esperanto**

**Pejno Simono**

**Versio 2010-09-22, 22h30**

# Enhavo

<b>1</b>	<b>Alfabeto</b>	<b>3</b>
1.1	Bazaj alfabetaj korespondigoj kaj aldonoj	3
1.2	Diftongoj kun fina “ŭ”	3
1.3	Diftongoj kun fina “ĵ”	4
1.4	Plena alfabeto	5
1.5	Ligaĵoj	6
1.6	R-principo	6
<b>2</b>	<b>Finaĵoj kaj disigoj</b>	<b>7</b>
2.1	Finaĵoj de substantivoj, adjektivoj kaj adverboj	7
2.2	La “no”-regulo	8
2.3	Pseŭdofinaĵo “aŭ”	8
2.4	Simplaj finaĵoj de verboj	9
2.5	Participoj	9
2.6	Disigo de ne-verbaj afiksoj	10
2.7	Noto pri la neuzo de “ing”	11
2.8	Radikoj kun fina vokalo - ekz. “-i-”	12
2.9	Rekomendoj	13
<b>3</b>	<b>Pronomoj</b>	<b>14</b>
<b>4</b>	<b>Tabelvortoj</b>	<b>15</b>
<b>5</b>	<b>Engrupigoj kaj mallongigoj</b>	<b>17</b>
5.1	Prepozicio + “la”	17
5.2	Pronomo + “estas, estis, ...”	17
5.3	Vortgrupoj	17
5.4	Transpreno de normalaj mallongigoj	17
<b>6</b>	<b>Kelkaj specialaĵoj (<i>daŭrigote</i>)</b>	<b>18</b>
<b>7</b>	<b>Komentoj de la aŭtoro</b>	<b>19</b>
7.1	Afiksoj Anglaj	19
7.2	Vokaloj signifodonaj	19
7.3	La litero “k”	20
7.4	Novaj signoj	21
<b>8</b>	<b>Kelkaj komparoj</b>	<b>22</b>

# 1 Alfabeto

## 1.1 Bazaj alfabetaj korespondigoj kaj aldonoj

c = **ĉ**   g = **ĝ**   k = **<**   j = **ĵ**   s = **ŝ**   u = **ŭ**

ĉ = **ĉ**   ĝ = **ĝ**   ĥ = **>**   ĵ = **ĵ**   ŝ = **ŝ**   ŭ = **ŭ**

ks, kz, (e)ks-, (e)kz-, (e)kc-, (e)ksc- = **x**

kv = **kv**   k-n / c-n = **kn**  
n-n = **nn**   k-m / c-m = **cm**

## 1.2 Diftongoj kun fina “ŭ”

En Esperanto konvenas difini aŭ enkonduki kelkajn oftajn diftongojn. Tiujn oni plej ofte bezonas ĉe la komenco aŭ fino de vorto.

aŭ- = **au**   aliloke **au**  
eŭ- = **eu**   aliloke **eu**

### 1.3 Diftongoj kun fina "j"

Esperanto estas konata pro siaj „aj-oj“ kaj „oj-oj“. Pro tio estus konvene trovi rimedon rapide skribi tiujn vortfine. La enkonduko de la punkto super la litero „j“ kiel mallonga „j“-formo post vokaloj solvas tion.

-aj = ʌ̣  
-oj = ɔ̣  
-uj = ụ  
-ej = ɛ̣

Do temas evidente pri konvenaĵo por pluraloj.

Iam oni povas ellasi la bazan vokalon kaj skribi nur la punkton sen kaŭzi konfuzon.

En kombinoj kun postan „n“ – do „-ajn“, „-ojn“, „-ujn“ – ne tro gravas kie precize oni skribas la punkton.

Oni ne uzu punkton inter du vokaloj! Tie apartenas **u**.

Notu:

tuj, tuja ʌ̣̣, ụ̣

## 1.4 Plena alfabeto

A	Λ	aŭ	Km	⊖	
a	∨	kaj	Kn	∩	kun
B	б, 0	-bl- ne eke	L	⊂	li
C	c	ci	pL	⊂	
Cm	⊖	vidu Km	M	⊂	mi
Cn	∩	vidu Kn	N	∩	ni
Ĉ	ŝ	ĉu	Nn	⊂	nun
D	⊖	do	O	⊖	si
E	⊂	Esperant-	o	∨	-ologi-
e	·		P	⊖	po
F	⊂		Kv	⊂	kvankam
G	⊂		R	⊂	
Ĝ	⊂	ĝi	S	⊖	si
H	⊂	ho	Ŝ	⊂	ŝi
Ĥ	>		T	⊖	tiu
I	Λ	io	U	⊂	
i	·		u	·	
J	u	ujo	Ŭ	⊂	-aŭ-, -eŭ-
j	·	(post vokalo)	V	∨	vi
Ĵ	⊂		Ks	x	ekzemple
K	<	kiu	Z	⊂	Zamenhofo

## 1.5 Ligaĵoj

Kiel en la Angla.

Jen kelkaj ekzemploj.

Morgaŭ, doni, teni, centro, naŭdek, omaĝo, staplo.

ṡ, 2, 3, 4, 5, 6, 7

## 1.6 R-principo

Kiel en la Angla.

Jen kelkaj ekzemploj.

Preta, kritiko, grado, kremo, problemo, arto, kruda, bredi.

7, 8, 9, 10, 11, 12, 13, 14, 15

## 2 Finaĵoj kaj disigoj

Vortradikoj kaj afiksoj oni rajtas laŭplaĉe disigi. Tio okazu plej ofte inter radikoj por eviti tro longajn bildojn malsupren, aŭ por montri vokalon. Ĉe sufiksoj oni plej bone disigi antaŭ la unua sufikso por montri la vokalon.

### 2.1 Finaĵoj de substantivoj, adjektivoj kaj adverboj

La bazajn finaĵojn „-o“, „-oj“, „-on“ kaj „-ojn“, same „-a“, „-aj“, „-an“, „-ajn“, „-e“ kaj „-en“ oni ne disigu se bone alligeblaj. Notu: oni ellasu la substantivan „-o“, sed ĉiujn aliajn vokalojn oni prefere skribu. Tamen oni ne ellasu la „o“ post radik- aŭ vort-fina „n“. (Vidu „no“-regulo.)

Juna viro


Junaj viroj

Junan viron

Junajn virojn

Supre

Supren



Evidente, jen la avantaĝo de la enkondukita punkta „j“.

Por pli rapide skribi oni rajtas skribi la „j“-punkton praktike ie ajn, eĉ post la „n“, kvankam ĝi fakte modifas la vokalon rekte antaŭ ĝi.

## 2.2 La “no”-regulo

Substantivojn aŭ afiksojn, kiuj finiĝas per „n“, oni nepre skribu kun „o“ post la „n“.

Vino, vinon, vinoj, vinojn *v, vj, v., vj.*  
Kono, konon, konoj, konojn *c, ĥ, c., ĥ.*

Tiu „no“-regulo estas necesa por distingi ekz. inter „vin“ kaj „vano, veno, vino, Vieno“, aŭ inter „kun“ kaj „kano, kino, kono, kojno, kuno“, kaj multaj similaj kolizioj. Ĝi aldone permesas alligi la sufikson „-in“ kaj poste distingi inter „vir-on“ kaj „vir-ino“. Aŭ „centon“ kaj „centono“

## 2.3 Pseŭdofinaĵo “aŭ”

Ĉe bazaj adverboj ktp kun fina „-aŭ“ oni same ellasu la tutan finaĵon.

Baldaŭ, ankaŭ, ankoraŭ, hieraŭ, hodiaŭ, morgaŭ

*ĉ, ĉj, ĉj., ĉj., ĉj., ĉj., ĉj.*

Tamen notu:

Naŭ, laŭ *o, o.*



## 2.4 Simplaj finaĵoj de verboj

Por „-as“ sufiĉu „-s“. Ĉe „-is“, „-os“ kaj „-us“ oni skribu la vokalon.

Amas, amis, amos, amus, ami, amu:



Do oni rajtas ellasi la „a“ en „-as“.

Por „est-as“ ktp. sufiĉas skribi nur la finaĵon en la T-pozicio. Al tiaĵo oni povas ligi pronomon.

Estis, estas, estos, estus, estu, esti.



## 2.5 Participoj

Por participoj oni skribu la finaĵon disigita kaj kun temp signifaj vokaloj en la T-pozicio. Simile kiel ĉe la simplaj verbaj finaĵoj, oni rajtas ellasi komencan „a“.

Amanta, aminta, amonta, amata, amita, amota



Notu en la D-pozicio:

Aminda, amenda





Dise estas plej ofte pli klare, ĉar tiam oni senprobleme vidas kie la radiko finiĝas kaj la afiksoj komenciĝas. La nombro da okazoj, kie oni ne povas montri la vokalon ankoraŭ ligante, estas tiom nombraj, ke disigi por montri la vokalon estiĝas nepre necesa meĥanismo.

Kroma efiko de la disigo, estas tio, ke fariĝas limo inter la radiko kaj ebla tuta grupo de afiksoj. Tiu limo inter la du ege plibonigas la legeblon.

## 2.7 Noto pri la neuzo de “ing”

De tiu disiga strategio sekvas, ke la Anglaj „-ang“, „-eng“, „-ing“, „-ong“ kaj „-ung“ estas malfacile aplikeblaj.

Certe,

sango, gongo, glavingo

○ŝ, ɣʷ, ɣʷʷ

estus ankoraŭ legeblaj. Sed akuzative, ne plu tiel:

○ŝ, ɣʷ, ɣʷʷ

Ni ricevas „s-an“, „g-on“ kaj „glav-in“. La afero iĝas iomete konfuza. Okaze de „s-ano“ laŭ la „no“-regulo la ĝusta formo estus: ○ŝ

## 2.8 Radikoj kun fina vokalo - ekz. "-i-"

Oni skribu la radikfinan vokalon kaj disigu la finaĵon, afikson aŭ afiksojn, kiuj sekvas. Ĉe tio substantiva „-o“ restas ne skribata. Akuzativan „-n“ oni povas alligi aŭ disigi laŭplaĉe, sed la adjektivajn „-a“ kaj „-an“ same kiel afiksojn oni nepre disigu. Same oni disigu ankaŭ simplajn verbajn finaĵojn.

Se la radikfina vokalo estas „i“ kaj skribita finaĵo sekvas, oni povas ellasi la „i“, se ne estiĝas konfuzo. Jen kelkaj ekzemploj tamen nun kun skribita „i“.

Defio, defion, defioj, defiojn

*di, di, di, di*

Defias, defiis, defios, defius, defiu, defii

*~ di, di, di, di*

Defiante, defiinte, defionte

*di, di, di*

Defia, defian, defiaj, defiajn

*di, di, di, di*

Notu, ke ne estiĝas kolizio inter „-ian“ kaj „-iano“ se oni ne skribas la „a“ antaŭ a-komencaj sufiksoj, sed skribas ĝin antaŭ adjektivaj akuzativaj finaĵoj.

## 2.9 Rekomendoj

Ĉe radikoj sen fina vokalo oni ne disigu la simplajn verbajn finaĵojn, sed tamen ĉiujn participajn finaĵojn. Ne necesas montri la vokalon „a“ post disigo.

„-iĝ“ oni disigu aŭ senvokale ligu laŭplaĉe. Ĝi estas ĉiam bone legebla.

„-ig“ oni povas senvokale ligi, sed tiam nepre disigu „-eg“.

„-an“, „-in“ kaj „-on“ oni rajtas disigi por pli bone distingi ilin de akuzativa „-n“. Ĉe „-an“ oni ne skribu la „a“. Sed vortfine ĉiuokaze ĉe ĉiuj tri oni skribu la finan „-o“ („no“-regulo).







„-aro“ oni eble ankaŭ disigu (sen „a“). Tio faras la distingon inter „-istar“ kaj „-estr“ pli sekura.

Ĉiuokaze, se oni disigas afikson, kiu komenciĝas per „a“, oni povas senprobleme ellasi tiun ekan „a“ –

Jen: „-ad“, „-at“, „-ant“, „-ar“, „-an“, „-aĉ“, kaj „-aĵ“.

Tio rapidigas la skribadon iomete. Kiu ne preferas tion, memkompreneble rajtas tamen skribi kun eka „a“.

### 3 Pronomoj

-i      -in      -ia      -ian      -aj      -ajn  
m-     .....  .....  .....  .....  ..... 

Simile kun ĉiuj aliaj. Ĉe la pluralaj formoj kun fina “-aj” eblas sen konfuzo faligi la “a” de la “aj”.

Notu, ke la “no”-regulo ebligas distingi inter akuzativoj kaj nominativo post radikfina “n”.

Ekz.

Min, mano/mino/mieno/mono  , 

## 4 Tabelvortoj

	ki-	ti-	ĉi-	i-	neni-
-u	ku	tu	ĉu	iu	nu
-o	ko	to	ĉo	io	no
-a	ka	ta	ĉa	ia	na
-e	ke	te	ĉe	ie	ne
-es	kes	tes	ĉes	ies	nes
-am	kam	tam	ĉam	iam	nam
-om	kom	tom	ĉom	iom	nom
-al	k'al	t'al	ĉ'al	i'al	n'al
-el	kel	tel	ĉel	iel	nel

Oni faligu la „i“, krom ĉe „iu“, „io“, ktp. Ĉe „ĉ“ oni rezignu pri la „h“ kaj skribu T-pozicie.

Notu: „ĉi“ oni skribu **ĉ**.

Jen kelkaj ekzemploj.

Kiu, kiun, kiuj, kiujn,      <u, <u, <u, <u.

Kia, kian, kiaj, kiajn      <u, <u, <u, <u.

Kio, kion, kie, kien      <u, <u, <u, <u.

La plej oftaj tabelvortoj estas sendube la vicoj „kiu, ...“ kaj „tiu, ...“ Ĉe tiuj speciale la „u“ estas iomete obstina. Eblas tamen mallongigi la tutan vicon kiel sekve:

Kiu, kiun, kiuj, kiujn      <, <, <, <.....

Tiu, tiun, tiuj, tiujn      -, -, -, -.....

Notu la distingon inter „kiun“ kaj „kion“      <, < .

Ĉi-tiu, ĉi-tio, tiu-ĉi, tio-ĉi, ĉi-ĉio, ĉio-ĉi

ĉ, ĉ, ĉ, ĉ, ĉ, ĉ.....

Notu ke „ĉu“ kaj „ĉe“ estas      ĉ, ĉ

Notu ke „kaj“ kaj „ke“ estas      <, <

Notu ke „ajn“ estas      ĉ.



## 5 Engrupigoj kaj mallongigoj

### 5.1 Prepozicio + “la”

Ĉe kombinoj kun „la“ notu, ke oni skribu la finan „a“ se la prepozicio mem hazarde finiĝas per „l“:

Do: „al la“ iĝu „ala“, „el la“ iĝu „ela“.

Sed: „ĉe la“ iĝu „cl“, „de la“ iĝu „dl“, ktp.

### 5.2 Pronomo + “estas, estis, ...”

La pronomojn oni povas kombini kun la „estas“-vico en la T-pozicio.

Do: „mi estas“ iĝu T-pozicie „ms“, „vi estis“ iĝu „vis“, „ni estos“ iĝu „nos“, „ili estus“ iĝu „ilus“, ktp.

### 5.3 Vortgrupoj

Aliajn frazigojn oni konstruu mem laŭ neceso – ekz. „kbb“ por „kiel eble plej baldaŭ“.

### 5.4 Transpreno de normalaj mallongigoj

Ĉiutagajn mallongigojn oni povas ofte rekte T-Liniigi:

E-o, s-ro, s-ino, f-ino, d-ro, uko, ktp, ...

## 6 Kelkaj specialaĵoj (daŭrigote)

Per, por, pri, pro .....  


Havas, povas .....  


Kara, karaj, kora, koraj .....  


Multaj, multajn .....  


Multe da .....  


lom da .....  


Kaj .....  


-ujo, -ejo, ujo, ejo .....  


monujo, monejo .....  


bedaŭrinde .....  


kompreneble .....  


## 7 Komentoj de la aŭtoro

### 7.1 Afiksoj Anglaj

El la Angla oni povas bone uzi kelkajn tieajn prefiksojn kaj postfiksojn aŭ skribmanierojn – ekz.:

„inter-“, „super-“, „-ment“, „-ology“, „-graf“, „-gram“, „-ance“, „-ence“, trans-, ktp.

Tamen aliaj vere ne estas iel uzeblaj – ekz.:

„-ship“, „-tion“, „-ly“, „-arity“, „-ality“, „-tivity“, „over-“, „under-“.

Ankaŭ „-ank“ kaj „-anch“, ktp. (ekz. en „bank“ kaj „bench“) ne estas uzeblaj pro la enkondukita disigaj reguloj.

Ĉar la plena „E“ estas uzata kiel mallongigo por la ege ofta E-o, la Angla serio „-able“, „-ible“ ktp. same ne plu funkcias. Oni uzu anstataŭe B por „eble“.

### 7.2 Vokaloj signifodonaj

La plej grava malfacilo ĉe tiu ĉi adaptiĝo de T-linio al Esperanto estas la fakto, ke oni ĝenerale ne skribas mezvortajn vokalojn laŭ tiu ĉi sistemo. En la Angla oni povas preskaŭ ĉiam supozi la ne-skribitan vokalon aŭ eĉ vokalgrupon. En Esperanto tiaj mezvortaj vokalaj povas esti ankaŭ „mezpostfiksaj“. Ĉiu vokalo eblas en ĉiu loko

kaj ĉiu ebla vokalo evidente donas alian signifon – ofte tempan – kiun oni plej ofte ne povas supozi baze de la kunteksto. Evidente „amito“, „amato“ kaj „amoto“ estas gravaj distingo. Same - „farinda“ kaj „farenda“.

### 7.3 La litero “k”

Entute „k“ estas iomete problemiga litero, speciale se T-linie la simbolo por „r“ sekvas. Sed uzi „c“ kiel en la Angla simple ne tiom bone funkcias en Esperanto. Por tio, alie ol en la Angla, „k“ estas iomete tro ofta. (Ekz. „paco“, „pako“, „peco“, „peko“, ktp.) Ankaŭ en la oficiala Germana T-linio oni uzas „k“ ĉi-cele pro la samaj motivoj. En Esperanto la uzo de „c“ por „k“ tiras la leganton simple tro forte al la Esperanta „c“ kaj ege ne al „k“. Tio estas pro tio, ke „c“ en Esperanto neniam prononciĝas „k“, sed ĉiam „ts“. Aldone la „k“-sona Angla kombino „ck“ en Esperanto tute ne ekzistas.

Tamen mi koncedu, ke „k“ ne speciale bone skribiĝas antaŭ „r“, „d“ kaj „t“ laŭ la T-liniaj reguloj rilate al „k“.

✓ c r

Sed pro tio uzi „cr“, „cd“ kaj „ct“ anstataŭ „kr“, „kd“ kaj „kt“ ne ŝajnas al mi esti akceptebla solvo.

✓ c r

Kvankam en la oficiala Germana adaptiĝo de T-linio oni ne plu uzas „c“ celante „k“ aŭ „ck“, oni aliflanke aplikas la ligaĵojn por „cn“ kaj „cm“ plu rilate „k“, alivorte, kaj por „c“-kombinoj, kaj por „k“-kombinoj. Mi faras same.

## 7.4 Novaj signoj

La decido enkonduki kelkajn novajn signojn rezultis ĉefe el la kombinoj „gh“ por „ĝ“. Ĉe ĉiu „iĝi“ devi skribi estus vere tre malkonvene pro ĝia vertikala longo.

La ĝ-problemo solvas tamen tre malofta - „hh“ por skribi „ĥ“. Por „ĥ“ oni povas uzi sufiĉe konvene aŭ aŭ .

Solvoj por „ŝ“ kaj „ĵ“ evidente jam ekzistis. Kaj verdire, kun „ch“ (kiel en la Angla) oni eble sufiĉe bone vivas.

Testoj montris, ke praktike skribi la duoblaĵon estas nur iomete pli malrapide ol skribi la novaĵon . Sed pro problemoj ĉe la ligado al renversa „c“-signo mi rezignis pri tiu ĉi novaĵo kaj nun proponas la tradician Anglan „ch“.

## 8 Kelkaj komparoj

Angla

via via

auto auto

Europe Europe

journal journal

year year

to be to be

chase chase

euro euro

quarrel quarrel

business business

psychology psychology

Esperanto

via via

aŭto aŭto

Eŭropo Eŭropo

ĵurnalo ĵurnalo

jaro jaro

de la de la

ĉaso ĉaso

eŭro eŭro

kverelo kverelo

eblas eblas

psik(h)ologio psik(h)ologio